


Verdaj verduloj

Lokaj naturfakuloj gvidos nian grupon nederlandlingve. Ni kompreneble provizos esperantlingvan tradukadon se ĉeestas alilingvanoj.

Ĉi-jare ni vizitos antaŭtagmeze la naturrezervejon/arbaron Ingelbos (Zulzeke) kaj posttagmeze la rezervejon Bouvelobos en Wortegem.

Tagmeze ni manĝos nian piknikon kune kun la aliaj partoprenontaj grupoj en la sportejo Kluisbos en Ruien.



Praktike

La tago konsistas el du promenadoj de 9h00 ĝis tagmeze kaj de 14h ĝis 17h. Eblas partopreni nur unu promenadon. Vidu la aliĝilon.

Temas pri naturpromenadoj, do vi eble bezonos botojn aŭ minimume fortikajn ŝuojn! Sed ne timu: estas nek 'fakekskurso' nek 'sportkonkurso'. Konsideru tamen ke plejofte la promenado ne taŭgas por puŝĉaretoj.

La startopunktoj de la promenadoj estas plej facile atingeblaj per aŭto. Se tamen vi deziras veni trajne prenu sufiĉe fruan trajnon al Oudenaarde kaj nepre avertu nin!

Ni petas kotizon de 3 EUR. Ebla profito iros al la 'Naturfonduso Flandraj Ardenoj'. Alportu mem vian piknikon.

Post aliĝo vi ricevos ĉiujn necesajn detalojn (inkl. vojindikojn).

Ne prokrastu vian aliĝon!



Tri bonaj kialoj por partopreni

Unue. Malkovru la naturon en bela flandra regiono dum la plej bela sezono.

Due. Apogu la klopodojn de la lokaj naturasocioj por konservi la ekologian kaj estetikan valoron de la regiono.

Trie. Montru al ne-esperantistoj ke la Internacia Lingvo funkcias.





19a APERO
DE ESPERANTO
EN LA

TAGO DE LA FLANDRAJ ARDENOJ

dimanĉon

la 15an de aprilo 2012



organizado:
'LA KONKORDO' – KORTRIJK

'La Flandraj Ardenoj' estas la nomo, kiun oni donis al monteta regiono en la okcidenta parto de Flandrio, 30 km sude de Gent kaj 30 km oriente de Kortrijk.

La 'Tago de la Flandraj Ardenoj' estas organizaĵo de lokaj naturasocioj, kiuj volas konatigi la naturriĉecon de sia regiono al plejeble granda publiko. Lokaj ĉiĉeronoj kondukas la vizitantojn al la plej interesaj ejoj de la regiono, el kiuj multaj normale eĉ ne alireblas.

Nia grupo estas la sola ne-nederlandlingva aŭ... danke al Esperanto la 'Flandraj Ardenoj' iĝas konataj trans lingvaj kaj ŝtataj limoj.

S-(in)-o(j)

(nomo kaj antaŭnomo)

(adreso)

(telefonnumero)

(retpoŝta adreso)

partoprenos kun personoj(j)

(=totala nombro de personoj)

al la Tago de la Flandraj Ardenoj, dimanĉon la 15an de aprilo 2012.

Mi venos per

(transportilo)

Mi restos la tutan tagon / nur antaŭtagmeze/
nur posttagmeze (indiku vian elekton)

Kaj ĝiros x 3 EUR al la konto
000-0428793-53 de 'La Konkordo' –
Kortrijk
(eksterlandanoj rajtas pagi surloke).

Dato:

Subskribo:

Sendu rete aŭ poŝte al:

Piet Glorieux

Pastoor Blanckestraat 8 poŝtkesto 0201

8610 KORTEMARK

T. (00 32) (0) 51 62 39 28

retadreso: piet.glorieux@gmail.com